

Reformo de la esperanto-instruado

Claude Gacond, 176-a radioprelego, 1967.02.22 & 1967.02.25

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtongan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En ĉiuj landoj la lernejaj programoj kaj la instruado estas reformataj. Estas fenomeno tutmonda, kiu respektas la transformon de la homa societo.

A.- Ĉar esperanto ne estas ofte lerneja instrufako, ĝi povis daŭre esti intruata ĝis nun per la kutimaj lernolibroj. Sed de kelkaj jaroj oni sentas en la pedagogiaj medioj esperantistaj la bezonon ankaŭ reformi la instruadon de nia lingvo.

Cl.- Hodiaŭ oni ne plu povas kontentiĝi instrui lingvon sen kontroli la efikon de la instruado. Kaj tiu kontrolo devigas la pedagogojn kompari la instru-metodojn, kompari la instruilojn.

A.- Tiu kontrolo montras por nia lingvo, ke ĝenerale la komencantoj estas kapablaj legi, sed ne paroli.

Cl.- En tio estas nenio eksterordinara. Ĉiuj lernolibroj, kiuj estas hodiaŭ aĉeteblaj provis kontentigi vastan publikon. Por ne tedi la klerulojn ili evitas sisteman gramatikan instruon, por eviti lacigi la simplulojn ili evitas doni tro precizajn informojn.

A.- Rezulto : la kleruloj malgraŭ tiuj lernolibroj, kaj post longa persona laboro, fine majstras la lingvon. Sed post kiom da hezititoj, post kiom da erariĝoj. Kaj la simpluloj aŭ forlasas la studon, aŭ aĉe parolas la lingvon kaj pro tio kutimiĝas al persona aŭ al kluba dialekto, el kiu ili poste tre malfacile liberiĝas.

Cl.- Tiu konstato ne estas kritiko kontraŭ niaj lernolibroj, kiuj certe efikis antaŭ kvindek jaroj, kiam oni pli legis, ol parolis la lingvon. Tiam oni havis la tempon kutimiĝi al la lingvo antaŭ ol ĝin ekparoli. Nun oni ĝin ofte lernas por povi partopreni kongreson. Oni do ne havas la tempon ĝin unue legi. La instrumentado devas do ŝanĝiĝi.

A.- Tamen, kiam oni ekzamenas lernolibrojn, oni povas esprimi kritikon al iliaj verkintoj. Anstataŭ observi la lingvon kaj provi formuli la regulojn post tiu observado, ili kontentiĝis ripeti, kion iliaj antaŭuloj asertis. Estas mezepoka sinteno, kiu nun malhelpas la disvastiĝon de nia lingvo kaj ties evoluon.

Cl.- Ni donu kelkajn tipajn ekzemplojn :

A.- Ni malfermas la kurson *Ni parolu en esperanto* de André Ribot, kiu estas larĝe disvendata en Francio. Kion ni legas en la unua leciono :

Cl.- « Ĉiuj nomoj finiĝas per **o**, ĉiuj adjektivoj per **a**, ĉiuj adverboj per **e** kaj ĉiuj infinitivoj per **i**. »

A.- Vi eble pensos : « Tio estas la vero, kion kritiki en tiu aserto ? »

A.- Ni observu :

Cl.- Pri la nomoj ni rimarkas, ke nur la komunaj nomoj finiĝas per **o**. La propraj nomoj virinaj pli kaj pli ricevas la finiĝon **a**. Ekzemple :

A.- **Andrea, Berta, Klara, Eva, Johana, Lidja, Julia...**

Cl.- Pri la adjektivoj ni rimarkas, ke kelkaj finiĝas per **u**:

A.- **Tiu** domo, **neniu** libro, **ĉiu** infano...

Cl.- Ni rimarkas, ke el kelkaj radikoj oni povas formi du adjektivojn :

Reformo de la esperanto-instruado
Claude Gacond, 176-a radioprelego, 1967.02.22 & 1967.02.25

A.- El la radiko **horizonto** oni povas formi la adjektivojn **horizonta** kaj **horizontala**. La **horizonta** linio, la planko ne estas **horizontala**.

Cl.- Ekzistas multaj tiaj radikoj, kiuj posedas du adjektivojn. Vi ne diras **Universa Esperanto-Asocio** sed **Universala Esperanto-Asocio**. Ĝis nun mi neniam trovis lernolibron, kiu donas klarigon pri tiu fakto kaj ebligas al la lernantoj distingi **universa** de **universala**.

A.- Pri la adverboj simpla observo ebligas konstati, ke en teksto ili pli ofte **ne finiĝas** per **e**, ol ili ricevas tiun **e** :

Cl.- Ni hazarde malfermu la hodiaŭ tre vendatan libron *Mi amis junulinon* kaj eklegu la paĝon 55-an :

A.- *Mia kara pastoro, **kial***

Cl.- (adverbo kiu ne finiĝas per **e**)

A.- *ĝis **nun***

Cl.- (adverbo kiu ne finiĝas per **e**)

A.- *neniu **iam***

Cl.- (adverbo kiu ne finiĝas per **e**)

A.- *diris al mi ĉion ĉi ? Nek miaj gepatroj nek nia katekisto nek mia afrika pastoro **iam***

Cl.- (denove tiu adverbo kiu ne finiĝas per **e**)

A.- *parolis kun mi pri tiuj problemoj. Kaj **kompreneble***

Cl.- Fine adverbo kiu finiĝas per **e**. Ni ĵus legis 5 adverbojn : **kial, nun, iam, iam** kaj **kompreneble**. Nur unu obeas la regulon, kiun la verkantoj de lernolibroj ripetas jam de 80 jaroj. Tiu falsa simpligo de nia gramatiko naskas falsan komprenon pri la spirito de nia lingvo.

A.- Ni ne havas la tempon detale tiel ekzameni ĉiujn falsajojn, kiuj estas instruataj en niaj elementaj lernolibroj. Ni nur menciu kelkajn :

Cl.- Malbona klarigo pri la participoj, silento pri la geografi- kaj popol-nomoj, manko de klarigoj pri la numeraloj, nenia instruado pri la gramatikaj kategorioj de la radikoj, nura instruado de la afiksoj listigitaj de Zamenhof kaj forgeso de ĉiuj aliaj sufiksoj : acio, izi, ologo, ologio, ktp.

A.- En alia prelego ni donos pliajn informojn pri la kaŭzoj, kiuj hodiaŭ trudas reformon de la esperanto-instruado.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-